

5

La Esploristo

De La Apaĉoj

En la sudorienta parto de la ŝtato New Mexico, kiu vaste pluigās en la terenon de Texas, altas la montoj de la Sierra Blanca, kies montaro estas pluigata de la Sierra Guadalupe al la sudo. Tiuj montoj formas terenon de sovaĝaj, ĥaose interigantaj altaĵaroj, kaj foje prezentiĝas kiel grandegaj, senkreskaĵaj bastionecaĵoj, kaj tie ĉi estas apartigataj per tie profundaj, preskaŭ orte krutaj *cañon*:oj, aliloke per nekrutaj mallevigantaj valfendoj, kiuj ŝajnas esti apartigataj de la ĉirkaŭa mondo ekde ilia ekestiĝo. Sed tamen la vento blovas polenojn kaj semojn trans la altaj randaĵoj kaj krestoj, tielke povas evoluiĝi plantokreskado. Tamen la bruna kaj la griza urso suprengrimpas laŭ la rokoj, pro tiam iri malsupren en la nefacile traireblajn solejojn. Tamen la migranta bizonon trovas tie ĉi kelkajn transpasejojn, trans kiuj ĝi kapablas trapenetriĝi dum la aŭtunaj kaj printempaj migradoj en aroj de mil bestoj. Tamen tie aperas foje blankaj, foje kuprokoloraj figuroj, sovaĝaj kiel la pejzaĝo mem, kaj kiam ili reforestas kaj malaperis, neniu scias, kio okaziĝis. La krudaj rokaj gigantoj ne diras unu vorton, la praarbaro silentas, kaj neniu homo iam komprenis la lingvon de la bestoj.

Ĉi supren venas la brava ĉasisto, helpata nur de si mem kaj sia pafilo. Ĉi supren venas la fuĝanto, kiu falis el la bonmora mondo. Ĉi supren kaŝvenas la indiano, kiu deklaris la militon al la tuta mondo, ĉar la tuta mondo volas neigi lin. Tie aperas foje la peltoĉapo de *trapper*, foje la vastranda sombrero de meksikano, foje la hararo de ruĝulo inter la branĉoj. Kion ili volas tie ĉi? Kio pelas ilin supren en tiujn apartigitajn altaĵojn? Estas nur unu respondo al tiu demando: la malamikeco kontraŭ homo kaj besto, batalado pro ekzistado, kiu ne ĉiam meritas tiun bataladon.

Malsupre sur la ebenaĵo kolizias la ĉasejoj kaj regionoj de la apaĉoj kun tiuj de la komanĉoj. Ĉe tiuj limoj okaziĝas heroecaj agoj, pri kiuj neniu historio rakontas. De la

interbataloj de tiuj bravulaj popoloj kelka sola kaj kelka malmultnombra societo estas pelata supren en la montaron, kaj devas defendiĝi tie je ĉiu paŝo kontraŭ la morto aŭ kontraŭ fortoj, kiuj ŝajnas nevinkeblaj.

La Rio Pecos fontas ĉe la Truchas Peak en la Sierra Moro, unue fluas sudorienten, kaj tiam turniĝas laŭ la Sierra Blanca rekte suden. Proksime je la suda fino de la montaro ĝi direktiĝas laŭ grandega arko okcidenten, inter montoj dekstre kaj maldekstre. Tiuj altaĵoj cedas je ambaŭ flankoj tiel malproksime reen, ke ĉi kaj tie flanke estas spaco por foje vasta, foje pli vasta preria streko, surkreskita de abunde verda herbaro, kiu finiĝas en la praarbaro, kiu malleviĝas de la altaĵoj ĝis la bazo de la montaro.

Tiu estas danĝera tereno. La montoj vastas, tiel ke nur malofte estas fendo, faŭko, kiu kondukas flanken, kaj ajn kiu renkontas malamikon tie ĉi, ne povas flankeniĝi, se li ne volas forlasi sian ĉevalon, sen kiu li pereos des pli.

Ni estis atingintaj tiun rivervalon, kiun mi jam konis. Nur malmulte pli norde estis la pueblo de Winnetou. Vere ŝatege mi estus farinta devojiĝon tien pro demandi pri mia amiko, eble eĉ renkonti lin mem. Sed mi devis rezigni pri tiuj pensoj; unue endis resti ĉe Mark Jorrocks kaj Bernard Marshal.

Hoblyn nun rajdis libere en la mezo de la grupo flanke de Cäsar. Mark estis antaŭe, kaj mi sekvis kun Bernard, kiu estis pruviĝinta kiel bona rajdanto.

Je la frua mateno ni estis naĝintaj tra la Rio Pecos, kaj tiam daŭrigintaj nian rajdadon sur la okcidenta bordo. Nun estis antaŭtagmezo, kaj la suno ĵus estis atinginta la pintojn de la altaĵoj trans la rivero. Ĝiaj briloj tuŝis nin bonfartige, ĉar la nokto estis estinta malvarmega, kaj la mateno tie ĉi estis tiel malseka kaj freŝa, ke ni ankoraŭ surhavis niajn kovrotukojn ĉirkaŭ la ŝultroj.

„Ĉu ni ankoraŭ rajdu longe ĝis la Rio Peñasco?“ Marshal demandis min.

„Ni atingus ĝin ankoraŭ hodiaŭ, se ni antaŭe ne flankeniĝu dekstren laŭ la priskribo de Hoblyn.“

„Ĉu ne estus pli bone unue iri al la Peñasco, kie ni trovos Fred Morgan:on?“

„Eĉ tiukaze ni ne direktiĝu rekte al la Peñasco, ĉar Morgan tiel rimarkus nin. Li certe estas tie, ĉar hodiaŭ estas la dek kvara de marto. Kaj cetere mi pensas, ke Patrick rajdis en la valon, do ankaŭ la patro troveblas tie.“

„*Have care!*“ Mark Jorrocks je la antaŭo de nia grupo vokis en tiu ĉi momento. „Tie sur la arbara rando estas branĉo, kiu ankoraŭ verdas. Ĝi certe estis derompita nur mallongan tempon antaŭe, kaj sekve iu estis tie ĉi en la lasta tempo.“

Ni rajdis pli proksimen kaj deĉevaliĝis. Mark prenis la branĉon, rigardis ĝin kaj tiam donis ĝin al mi.

„Ekzemple vidu al tiu aĵo, Charley!“

„Hm, mi pensas, ke tiu branĉo estis deriompita apenaŭ antaŭ unu horo.“

„M'ankaŭ pensas tion. Ĉu vi vidas la piedpremaĵojn tie ĉi?“

Mi kliniĝis al la tero.

„Blankulo! Verŝajne Patrick aŭ lia patro. Ni ne povas pluiri, Mark!“

„Vi pravas. La fiulo ne rimarku, ke iu sekvas lin. Sed, se li tie ĉi estis deĉevaliĝinta, li certe havis intencon dum tio. Tie li lasis stari la ĉevalon, kiu gratis per la hufoj, kaj

tie ĉi pieda spuro iras en la arbaron. Ni vidu!“

Ni lasis la aliajn tri atendi, kaj iris en la arbaron, sekvante la spuron. Tiel ni devis iradi kelkan distancon, ĝis Mark, kiu iris antaŭe, ekstaris. Ĵus antaŭ li la tero estis dispirobatita kaj la muskokovro lozigita. Aspektis, kvazaŭ oni estis fosinta sub ĝi, kaj poste remetis ĝin sur ĝian eksan lokon. Mi kliniĝis kaj forigis la muskon.

„Fendilo!“ Mark vokis.

„Ĝuste!“ mi asertis. „Tie ĉi kuŝis fendilo.“

Sub la musko la loza, mucideca tero enhavis la klarvideblan premaĵon de fendilo, kiu antaŭe estis kaŝanta tie ĉi.

„Mark venis tien ĉi pro preni ĝin. Sed kiu kaŝis ĝin tie ĉi?“ Mark demandis.

„Tiu demando facile respondeblas“, mi klarigis al li. Kiam la *capitán* kaj la leŭtenanto estis enterigintaj la trezoron kaj forlasintaj la valon, tiu ilo estiĝis tro peze al ili, kaj ili lasis ĝin tie ĉi. Do nun fakte nur Patrick povis esti tie ĉi, ĉar la *capitán* ankoraŭ estas malantaŭ ni, kaj Fred Morgan ne konas tiun lokon. Tutcerte ni trovos signon sur la arorandaj arboj, kiun faris la *capitán* kaj la leŭtenanto pro la kazo de la reveno, ĉar la fendilo ja estas rebezonata pro la elterigo de la trezoro.“

Mi remetis la muskon sur la kaŝejon kaj iris reen pro rigardi al la arboj ekstere. Ĝuste! Je du, fakte tiuj, kiuj staris dekstre kaj maldekstre de la spuro, ankoraŭ videblis la spuroj de tri entranĉaĵoj, entranĉitaj unu super la alian, kaj krome oni derompis la plej malsuprajn branĉojn de ambaŭ arboj.

„Kio konkludeblas per ĉi ĉio, Charley? Ĉu vi povas elpensi tion?“ Sans-ear demandis min.

„Sambone kiel vi, kaj ĉiu alia, ĉar elpensi tion vere facilas: Patrick fakte havas la intencon iri en la valon.“

„Prave. Necesas, ke ni atingas ĝin antaŭ li, do estas la demando, ĉu li rekte iras tien, aŭ unue serĉas sian patron.“

„Tion ni tuj ekkonos.“

Mi turniĝis al Hoblyn:

„Ĉu ni ankoraŭ devas iri longe tien, kie via vojo flankeniras en la valon de la Pecos?“

„Maksimume du horojn plu, se mi bone memoras.“

„Tiukaze ni rajdos ĝis tie. Se Patrick iris laŭ tiu vojo, li iras rekte al la kaŝejo; sed se li pluiris en la nunan direkton, li unue volas venigi sian patron, kaj ni decidus laŭ lia konduto! Cetere Patrick povas esti apenaŭ horon antaŭ ni. Per tiu kaŭzo estas konsilinda resti kelkan tempon. Eble li haltis ie pro ajn iu kaŭzo, kaj tiukaze ni irus rekte antaŭ liajn okulojn.“

„*All right*, Charley“ Sans-ear kapjesis. „Ni restu tie ĉi! Sed ni ne estu tiel malgardiĝe kiel li, kaj ne lasu la ĉevalojn en la liberon. Tiru ilin inter la arbojn, kaj prenu kelkajn manĝaĵojn el la poŝoj, ĉar mi ekzemple ricevis neniun mordaĵon inter la dentojn ekde la sunleviĝo!“

Ni agis laŭ lia propono kaj sidiĝis sur la softan muskon. Apenaŭ tio estis farita, kiam Hoblyn elpuŝis malfortan vokon, kaj montris per la mano en la laŭfluan direkton ekster la arbojn.

„Vidu al la kanjono tie supre je la Pecos, *mes'sur*:oj! Ĵus estis al mi, kvazaŭ mi estis vidinta ion brileti je ĝia plej alta pinto, io kiel ŝtala lancpinto.“

„Neeble!“ Sans-ear diris. „Kiel oni povas rimarki lancpinton de tiu distanco?“

„Sed tamen, Mark“, mi respondis. „Kiam la okulo vidas rekte al la loko, kie ĝi troviĝas, tio facile eblas. Sed tiajn lancojn havas nur la *indsman*:oj, kaj tial devus esti — verece, nun mi ankaŭ vidis brileton, foje tute supre, kaj poste iom pli malsupre. Aŭskultu, Vi viroj, tiuj nur povas esti indianoj, kaj estas nia granda feliĉo, ke ni havis la ideon kaŝiĝi tie ĉi! Se ni estus plurajdintaj, ili senkondiĉe devis rimarki nin, ĉar la suno estas rekte antaŭ ni.“

Mi elprenis mian teleskopon kaj direktigis ĝin al la kanjono. Kion mi ekvidis, bonaŭgis zorgigi min.

„Jen, Mark, vidu pli detale al la rajdantoj! Ili estas almenaŭ cent kvindek.“

Li prenis la teleskopon, kaj poste donis ĝin al Bernard.

„Vidu al la ruĝhaŭtuloj, *Mr. Marshal*! Ĉu Vi iam antaŭe havis kontakton al komanĉoj?“

„Ne jam. Do estas komanĉoj, ĉu?“

„Jes. Laŭ la lando boneble ankaŭ povus esti apaĉoj, sed tiuj havas aliajn harkrestojn kiel la homoj, kiuj venas malsupren tie. Ĉu Vi vidas la ruĝajn kaj blujajn kolorojn, per kiuj ili ŝminkis iliajn vizaĝojn? Tio estas la certiga signo, ke ili rajdas sur la milita vojo. Tial ili akriĝis iliajn lancpintojn tiel brile, kaj en ĉiu sagujo estas kelkaj sagoj, kun kiuj mi ekzemple ne volas havi kontakton. Kion vi opinias, Charley, kio, se ili preteriros tie ĉi?“

„Ili tutcerte rimarkos nin.“

„Se ni nur povis eliri pro forigi la branĉon kaj forviŝi niajn spurojn. Sed tio ne plu eblas.“

„Sed tio ankaŭ ne helpus, Mark, ĉar ili trovos niajn spurojn pli supre, kaj certe sekvos ĝin tien ĉi.“

„Tion mi scias. Sed ni tiel povis gajni tempon pro elŝtormi kaj forfuĝi, antaŭ ili revenos.“

„Ĝustas. La hufspuroj estas rekte je la rando. Eble oni povas fari tion senke oni elpaŝu.“

Malantaŭ mi staris malseka, maldika trunko de abio. Mi detranĉis ĝin kaj altiris la branĉon per ĝi. Tiam mi serĉis lokon, kie malsekaj pingloj kuŝis sur la tero, enkollektis kelkajn manplenojn de ili kaj disĵetis ilin sur la spuron, kiuj sed fakte estis nur tiel malklare videblaj, ke ĝi povis esti rimarkata nur de akra okulo de indiano.

„Ni vidu, ĉu tio taŭgos, Charley“ Sans-ear diris. „Vi ne povus trompi min per tio.“

„Kial?“

„Ĉu acero havas abiajn pinglojn?“

Fakte rekte super la spuro estis acero, sed la afero nun ne plu estis ŝanĝebla. Krome nun la *indsman*:oj plene okupis nian atenton. Ili ĵus estis atingintaj la malsupran parton de la kanjono, haltis tie, kaj elsendis kelkajn militistojn pro esplorado.

„*Heigh-day*, ili ne venas tien ĉi!“ Mark vokis ĝoje.

„Per kio Vi vidas tion?“ Bernard demandis.

„Klarigu tion al li, Charley, ĉar vi nun foje komencis esti lia instruisto!“

„Tre facile“, mi instruis Bernard:on. „El la tri viroj, kiuj forrajdis pro esplorado, du rajdas laŭ la altaĵo laŭflue, kaj unu al la akvo. Ili do volas transriveriĝi, sed ne venos supren, ĉar ili tiukaze esplorus la terenon ne malsupren, sed supren. Do la du esploru ĝin pri spuroj, do pri ĝia sekureco, dum la tria esploru, ĉu la Pecos tie ĉi taŭgas pro traŭro.“

Baldaŭ ĉiuj tri revenis al la atendantoj. Ili ŝajnis alporti bonajn mesaĝojn, ĉar la tuta trupo ekmoviĝis rekte al la akvo. Ni povis nombrigi ilin per la nura okulo, kaj rezultis, ke mi taksis ilin plie tro multe ol malmulte. Ili ĉiuj estis junaj, fortaj homoj, kiuj certe apartenis al du subtriboj aŭ vilaĝoj, ĉar du ĉefoj rajdis je ilia antaŭo.

„La du kun la agloplumoj en la haroj estas la ĉefoj, ĉu?“ Bernard demandis.

„Jes.“

„Mi aŭdis, ke la estroj ĉiam rajdas blankajn ĉevalojn, ĉu?“

„Ĉu blankajn ĉevalojn? Hihihihih!“ Mark ridadis amuzigite.

„Tiukaze Vi estas misinformigita, Bernard“, mi diris. Transe, sur la malnova kontinento povas okazi, ke batalestro rajdas sian favoratan blankulon, sed ne tie ĉi. Indiano ĝenerale ne ŝatas helajn kolorojn je ĉevalo, kaj ĉar li ne povas uzi blankan ĉevalon dum ĉasado, ĉar la blanko forpelas la ĉasbestojn, dum militado li ne povas uzi tian eĉ des pli. Nur dum la vintro, kiam la blanka koloro estas kamuflaĵo, povas okazi, ke oni surĉevaliĝas sur blankulon, kaj tiukaze la rajdanto antaŭ surmetas blankan katunaĵon. Mi mem foje faris tion kun bona sukceso supre je la norda parko.“

Intertempe ĉiuj ĉevaloj de la ruĝuloj estis irintaj en la akvon, kvankam la Pecos tie ĉi havis fortan fluon, sed ili teniĝis tiel brave, ke rezultis preskaŭ kelkaj metroj de fordrivo, kiam ili atingis la alian bordon. Nun denove oni esploris la ĉirkaŭon, kaj tiam la trupo forrajdis laŭflue.

Nun ni povis senĝene trankviliĝi, ĉar la vera danĝero ne estis estinta malgrande al ni. Mark karegis la kolon de sia ĉevalino.

„Kion vi pensas, maljuna Tony, kion, se la ruĝuloj estus forbalaintaj nin hodiaŭ, la orelojn de mi, kaj la voston de vi? — Nu do, tio ja jam okazis antaŭe!“ li ridetante interrompis sin mem, kaj poste turniĝis al mi.

„Sed Charley, kio okazos nun ekzemple al Patrick? Ĉar lian spuron ili ja certe rimarkos!“

„Ili ne faros ion al li“, Hoblyn rimarkiĝis.

„Ĉu nenion? Kial?“

„Ĉar ili konas lin. Estas komanĉoj el la tribo de la Rakuroj, kun kiuj li kaj la *capitán* fumis la pacopipon, ĉar ni estis fornegoĉiantaj multajn el niaj akiraĵoj al ili.“

„Tio malbonas, ĉar tiel facile eblas, ke li alianciĝos kun ili kontraŭ ni.“

„Ni ankaŭ pretiĝu pri tio, Mark“, mi konsolis. „Patrick evitos kunpreni la ruĝulojn en la valon! Maksimume la ĝentileco postulos, ke li restu ĉe ili kelkan tempon pro fumi la kalumeton kun la ĉefoj. Tiam li reostos sia propra decidanto.“

Mi paŝis al la rando de la arbaro kaj ŝovis la kapon tra la branĉoj pro vidi post la ruĝuloj. Ili jam estis malaperintaj malantaŭ la neksta kurbaĵo de la rivero kaj de la

montoj. Antaŭ mi ŝoviĝis reen, mi direktiĝis mian vidon foje kontraŭfluen, kaj — rapide reenigis mian kapon malantaŭ la branĉojn. Mark rimarkis tiun rapidan, preskaŭ fulman movon kaj demandis:

„Kio estas? Ĉu tie supre ankaŭ venas indianoj?“

„Laŭŝajne, jes. Almenaŭ unu iras tie transe laŭ la eliro de la kanjono.“

La teleskopo ankoraŭ kuŝis flanke de Sans-ear, kaj li alokuligis ĝin.

„*Zounds*, tio ĝustas! Sed estas nur unu, se ne eble aliaj plu estas malantaŭ li.“ Li ankoraŭ elvidis kaj subite levis la kapon. „Sed kion mi vidas! Tio ekzemple estas apaĉo!“

„Ĉu apaĉo?“

„Jes. Liaj haroj falas loze kaj longe. Ĝi pendas longe ĝis lia dorso. Nun li rajdas al la akvo.“

„Donu la teleskopon al mi!“

Mark donis ĝin al mi, sed bedaŭrinde mi ne povis vidi ion plu, ĉar la viro jam troviĝis en la akvo kaj estis kaŝata de altaĵo de la ĉiflanka bordo.

„Ĉu vi scias, kio okazas, Charley?“ Sans-ear demandis. „La komanĉoj, senke ili scias tion, estas sekvataj de la apaĉoj, kaj ties esploristo antaŭiris pro ĉiutempe rigardi ilin. Li faras tion diable ruze, ĉar li ne sekvis iliajn spurojn, sed rajdis super ili en la najbara kanjono trans la montoj. Paŝu reen, ĉar la ruĝuloj havas akrajn okulojn! La apaĉo tutcerte preterpasos tie ĉi, tial mankovru la nazojn de Viaj ĉevaloj! Ili kutimas spiregi, kiam indiano aperas en la proksimo. Mia Tony fakte havas iom pli da kaĉo en la kapo. Kaj nun silentu!“

Ni ne povis vidi la apaĉon veni, ĉar ni troviĝis je la supra parto de valkurbo, sed estis apenaŭ pasintaj kvin minutoj post la elparolo de la lasta vorto, kiam ni aŭdis la paŝojn de lia ĉevalo.

La aliaj estis reenigintaj, sed mi kuŝis antaŭe sur la arbara rando malantaŭ sufiĉe densa arbedo. La esploristo venis, malrapide ekzamenante la teron. Ĉu li eble rimarkis kelkajn suprenpiedbatitajn herbtigojn aŭ ian alian spuron? Certe ĝi estis tiel, ĉar nun li haltis rekte vidalvide ĉe mi, kaj direktigis sian vidon al la pingloj, kiuj mi antaŭe estis elĵetinta. Tuj li staris sur la tero, kun la tomahoko en la pugno, ĉar li eksuspektis. Sed mi urĝis same rapide, kiel li estis deĉevaliĝinta, tra la arbedo kaj hastis renkonte al li. Lia muskola brako resvingis pro fortega bato.

„Winnetou!“ mi vokis. „Ĉu la granda ĉefo de la apaĉo volas mortigi sian fraton?“

Li mallevis la brakon, kaj liaj malhelaj okuloj ekbrilis hele.

„Ŝarlih!“

Li vokis nur tiun unu vorton, sed en la sono estis ĝojo, kiun fiera *indianman* alikaze pli ŝate regas ol laŭtigas. Tiam li svingis siajn brakojn ĉirkaŭ mi, kaj premis min al si.

Ankaŭ mi ĝojis elkore pri tiu renkonto. Sed nun ne estis la tempo longe esprimi sentojn.

„Kion mia frato faras je tiu loko de la Pecos?“ mi demandis.

Winnetou ŝovis la tomahokon en la zonan.

„La komanĉoj forlasis ilian restejon pro molesti la apaĉojn. La Granda Spirito diras, ke Winnetou venkos ilin. — Kaj kion faras mia frato en tiu ĉi valo? Ĉu li ne diris antaŭ

multaj lunoj, ke li migrus reen trans la granda akvo al la *wigwam* de sia patro kaj de sia fratino?“

„Mi vidis la *wigwam*:on de la patro, sed la spirito de la savano revokis min dum la lumo de la tago kaj dum la sonĝo en la nokto. Tiam mi sekvis ĝian voĉon.“

„Mia blanka frato agis ĝuste. La koro de la prerio estas granda kaj vasta. Ĝi enhavas la vivon kaj la morton, kaj ajn kiu sentis ĝian pulsadon, tiu ja povas foriri, sed li revenos ĉiam refoje. *Hough!*“

La ĉefo ekprenis la kondukilon de sia ĉevalo kaj paŝis kun mi sub la arbojn. Maljam tie li ekvidis miajn kunulojn. Kvankam mi ne estis menciinta ilin per unu vorto, li tute ne ŝajnis esti surprizigitaj pri ilia ĉeesto; plie li ŝajnis, kvazaŭ li ne rimarkis ilin. Li ekprenis la pipon kaj la tabaksaketon kaj sidiĝis per dignoplena teniĝo.

„Winnetou estis for en la nordo, pro fosi la sanktan argilon por sia kalumeto“, li diris, „kaj Old Shatterhand estas la unua, kun kiu li fumas el ĝi.“

„Ankaŭ aliaj fumos kun mia ruĝa frato“, mi diris. „Ĉu la granda ĉefo de la apaĉoj jam aŭdis pri Sans-ear, la brava ruza ĉasisto?“

„La apaĉo konas lin, sed ne jam vidis lin. Sans-ear estas ruze kiel la serpento, sagace kiel la vulpo kaj brave kiel la jaguaro. Li trinkas la sangon de la ruĝaj viroj, kaj entrancis ilian ekmorton en la tenilon de sia pafilo. Sed li mortigas nur la maliculojn. Tie staris lia ĉevalo. Kial li ne venas al Winnetou pro fumi la pipon de la paco kun li?“

Mark stariĝis kaj alpaŝis. Mi povis vidi, ke li konsciis nun renkonti la viron, kiu estis konata kiel la plej eminenta, brava kaj justa militisto de ĉiuj savanoj.

„Mia ruĝa frato parolis prave. Mi mortigas nur la maliculojn, sed mi donas mian helpon al la bonuloj“, li asertis.

Mi ankaŭ signis al Bernard alveni.

„La ĉefo de la apaĉoj ankaŭ lumigu sian okulon al tiu militisto. Li estis riĉa viro. Sed la blankaj murdistoj mortigis lian patron kaj rabis liajn diamantojn kaj juvelojn. La murdisto estas tie ĉi ĉe la Rio Pecos. Li ekmortos per lia mano!“

„Winnetou estas lia frato. Li helpas al li kapti la murdinton de lia patro. *Hough!*“

Tiu vorto de Winnetou ĉiam estis aserto, kiu estis sankta al li. Do mi gajnis helpon por Bernard, kian ni ne estis povintaj deziri pli bonan. La apaĉo nun estis ŝtopinta sian pipon kaj bruligis ĝin. Post li unue estis blovinta la fumon supren al la ĉielo, tiam malsupren al la tero, li elpuŝis ĝin al la kvar direktoj de la ĉielo, kaj tiam donis la kalumeton al mi. Mi faris la samon kaj pludonis la pipon al Mark. Post ankaŭ Marshal finigis la ceremoniaĵojn, la kalumeto revenis en la manojn de Winnetou. Tiam Mark demandis la apaĉon:

„Ĉu mia frato havas multajn militistojn en la proksimo?“

„Uf!“

Tiu vorto de Winnetou ĉiam estis esprimo de miro. Mark ne jam konis la kutimojn de la apaĉo, kaj ĉar li ricevis nur tiun sonon kiel respondo, li pensis, ke li estis miskomprenita. Tial li ripetis sian demandon.

„Mi demandis, ĉu mia ruĝa frato havas siajn militistojn en la proksimo?“

„Uf! Mia blanka frato diru al mi, kiom ursoj ĉeestu pro piedpremi mil formikojn!“

„Nur unu.“

„Kaj kiom krokodiloj pro gluti cent bufojn?“

„Nur unu.“

„Kaj kiom ĉefoj de la apaĉoj pro sendanĝerigi tiujn komanĉojn? Kiam Winnetou elterigas la hakilon de la milito, li ne kunprenas siajn virojn, sed li iras sole. Li ne konas unu solan subtribon, kies ĉefo li estas, li estas la plej altranga ĉefo de ĉiuj apaĉoj. Li povas levi la manon ajn ie, kaj mil militistoj alkuras pro efikigi liajn ordonojn. Li havas multajn langojn, kiuj rakontas al li, kion faras la militistoj de la komanĉoj, kaj li estas sufiĉe forta defendiĝi kontraŭ la malamikoj senpene.“

Tiam li turniĝis al mi.

„La viro parolu per la pugno. Sed mia frato Ŝarlih rakontu al mi, kion li volas fari kun la viroj, kiuj estas kun li.“

Mi donis al li mallongan, sed ekzaktan raporton pri la okazoj, kiuj kondukis nin al la Pecos. Li aŭskultis atente kaj tiam vidis al la tero kelkan tempon. Blovante la lastan fumon el sia pipo, li stariĝis kaj rependigis la kalumeton ĉirkaŭ sian kolon.

„Miaj blankaj fratoj sekvu min!“

La apaĉo iris al sia ĉevalo, elkondukis ĝin kaj sursvingiĝis. Mi teniĝis je lia flanko, kaj per rapida rajdado ni pluiris laŭ nia vojo. Winnetou rajdis brunan, kompaktan ĉevalaĉon, kiun mi jam konis de pli frua tempo, estis besto, kiun li ŝate uzis pro esploradojn, kiam li volis ŝpari la fortojn de sia nigra virĉevalo Iltŝi. Tiu ĉevalo tute havis la aspekton de finuzinta ĉarĉevalaĉo, kaj nur konulo kiel Winnetou povis decidiĝi uzi ĝin kiel rajdbesto. Ĝi galopis bonege, trabis trankvile kaj paŝis longege kaj neelĉerpiĝe kaj kun forta pulmo. Ĝia komprenemo tute ne estis subigita de tiu de la ĉevalino de Mark, kaj per ĝiaj akraj, ŝtalmalmolaj hufoj ĝi forfuĝigis pli ol nur unu fojon la danĝeran grizan lupon aŭ eĉ la pumon.

Kiam ni atingis la spurojn de la komanĉoj, ni rimarkis, ke la trupo pensis sin esti sufiĉe sekure, ĉar oni ne estis klopodinta nerimarkebligi la spuron. Tiel ni rajdis certe horon, haltante je ĉiu kurbo de la vojo, pro unue gardiĝe vidi al la vojo antaŭ ni. Ni ĵus estis venintaj al alia arbara rando, kaj ĵus volis rajdi ĉirkaŭ ĝi, kiam la apaĉo subite ŝiris sian ĉevalon reen.

Li montris antaŭen per la dekstra brako, dum la kunigita maldekstra mano donis la signon silenti kaj gardiĝi. Mi ŝovis mian kapon antaŭen kaj klopodigis miajn okulojn, sed ne povis rimarki ion.

Winnetou pendigis sian pafilon al la seltenilo, deĉevaliĝis, elzongis la tranĉilon kaj malaperis inter la arboj sen diri unu vorton.

„Kion signifu tio, Charley?“ Mark demandis.

„Mi ne scias. Li rimarkis ion suspektigan, kaj foriris pro certiĝi. Tion vi rimarkis per lia konduto, kaj tial li ne devis fari paroladon. Ni atendu tie ĉi malantaŭ la angulo ĝis li revenos aŭ donos signon al ni.“

„*Massa*, ho, ha, ka *massa* aŭdis?“ Ĉasar interrompis la mallongan vortinterŝanĝon.

„Kion?“

„Kriis kvale animalo!“

„Kie?“

„Ibe dop angulo!“

Mi vidis al la aliaj demande, sed neniu aŭdis ion, sed la negro tamen povis pravi.

Tiam eksonis — kaj nun ni ĉiuj aŭdis ĝin — alloga bleko de mokbirdo. Ĉiu alia estis pensinta, ke tiu sono vere estis la voĉo de tiu malgranda plumhava amiko, sed mi sciis, ke ĝi venis el la buŝo de la apaĉo, ĉar ni ofte estis uzinta tiun vokon kiel signon dum niaj antaŭaj vojaĝoj.

„Mokbirdo tie ĉi“, Mark diris. „M'ekzemple volas scii, kie tiu birdospeco estas ne trovebla!“

„Tiun birdospecon vi hodiaŭ vidis kaj aŭdis la unuan fojon“, mi sciigis lin. „Estas Winnetou, kiu vokas nin. Antaŭen, tie li staras je la arbara rando!“

Mi ekprenis la kondukilojn de la ĉevalo de la apaĉo, kaj la aliaj sekvis. Winnetou staris kelkajn cent paŝojn for de ni je la rando de la arbaro, sed malaperis inter la arboj, kiam li estis rimarkinta, ke ni venis per lia voko. Atinginte la lokon, mi deĉevaliĝis kaj paŝis sub la arbojn. Tie la apaĉo atendis, kaj antaŭ liaj piedoj kuŝis juna viro, fiksligita per sia propra zono. Timplene li direktigis siajn okulojn al Winnetou kaj mallaŭte ĝemis.

„Fitimemulo!“

La apaĉo diris nur tiun unu vorton, tiam li malestimante deturniĝis. La kaptito estis blankulo. Kiam li ekvidis min, liaj trajtoj iomete pli trankviliĝis. Certe li ekhavis pli da espero, ĉar mi apartenis al la sama raso, kaj tiu espero eĉ pli altiĝis, kiam nun ankaŭ Mark alpaŝis.

„Blankulo!“ Mark vokis. „Kial mia frato traktas lin kiel malamikon?“

„Malica okulo!“ Winnetou respondis krude.

Malantaŭ ni nun eksonis laŭta voko, kaj kiam mi turniĝis reen, mi vidis, ke Marshal vidis al la kaptito per nepriskribebla mienesprimo.

„Holfert! Pro la volo de Dio, kiel Vi venis tien ĉi?“

„Marshal! *Mr.* Marshal!“ la alparolito balbutis konsternite. Do estis Holfert, la eksa dungito de la Marshal:oj, la fihelpinto de Morgan.

Mi turniĝis al la kaptito:

„*Mr.* Holfert, ni serĉadis Vin longan tempon. Ĉu Vi eble havas la bonvolon diri al mi, kie troviĝas Via bona amiko, kiu nomiĝas Fred Morgan?“

Li ektimis.

„Ĉu Vi estas detektivo, *Sir*?“ li demandis.

„Kiu aŭ kio mi estas, tion Vi ekscios, sed mi volas diri al Vi, ke mi ne volas trakti Vin kiel juĝisto, ĉar mi emas supozi, ke Vi nur estis delogita. Do respondu! Kie estas Morgan?“

„Malkatenigu min, *Sir*, tiam mi diros ĉion!“

„Ni ne ekhavas la ideon malkatenigi Vin, sed ni iomete lozigos Viajn katenojn. Cäsar, lozetigu liajn katenojn!“

La negro alpaŝis kaj kliniĝis malsupren.

„Cäsar, ĉu ankaŭ vi?“ Holfert vokis surprizigite.

„Cäsar anke hike, *yes!* Ho, Ube es *massa* Bern', ibe anke sempre es negro Cäsar.“

La nigrulo lozigis la zonon ĉirkaŭ Holfert, tiel ke la kaptito povis sidi rekte. Mi daŭrigis la demandadon.

„Do trian fojon: Kie estas Morgan?“

„Ĉe la Rio Peñasco.“

„Kiel longe Vi estis ĉe li?“

La homo silentis. Mi elzonigis la revolveron.

„Vidu al tiu ĉi eta aĵo, Mr. Holfert! Mi scias ekzakte, kion mi pensu pri Vi, sed mi tamen deziras, ke Vi rakontas al mi ion pli detalan pri la ekmorto de Via *brother* kaj la malapero de lia posedaĵoj. Se Vi ne parolos, aŭ se Vi parolos la malveron, Vi ricevos kuglon. En la okcidento oni ne longe okupiĝas pri rabmurdisto tiel longe kiel tie en la orientaj ŝtatoj!“

„Mi ne estas murdisto!“ la viro asertis en plej ega timo.

„Mi jam diris al Vi, ke mi scias ekzakte, kiel mi taksu Vin. Ĉio nur dependas, ĉu ni traktu Vin kiel malhelpeman aŭ konfeseman homon. Do, Vi konis Morgan:on jam antaŭe, ĉu?“

„Li estas parenculo de mi.“

„Kaj li vizitis Vin en Louisville, ĉu?“

„Jes.“

„Plu! Mi ne emas fari amason da demandoj, kiam Vi povas paroli nedevigite. Pensu pri la revolvero!“

„Kiam *Mr. Marshal* foriros, mi rakontos ĉion!“

Mi devis respekti la sentojn de la tiel neekspektite trovitaj krimulo.

„Ni agos laŭ Via volo.“

Dum tio mi mansignis al *Marshal*, kiu ja foriĝis, sed, kion mi certe rimarkis, revenis laŭ arko kaj stariĝis al la dorso de la kaptito malantaŭ la trunko de arbo. Mi deziris vidi la korajn sentojn de lia koro en tiu momento.

„Nu do!“

„Fred Morgan vizitis min ofte, kaj mi lasis min persvadi hazardludi kun li.“

„Li vizitis Vin en Via loĝejo, ĉu?“

„Jes, neniam en la vendejo. Mi gajnis, kaj pluludis pasie. Tiam mi perdis, ĉiam kaj ĉiam plu, ĝis mi ŝuldis al Fred kelkajn mil dolarojn. Mi ne povis pagi la ŝuldon, kaj li minacis al mi per anonco ĉe la polico, ĉar mi estis doninta al li tratojn kun la falsigita subskribo de mia estro. Nun mi ne plu povis saviĝi alimaniere, mi devis diri al li, kie troviĝis la ŝlosilo de la vendejo.“

„Vi sciis, kion Morgan volis fari tie, ĉu?“

„Jes. Ni volis partigi la akiron kaj tiam iri al Meksikujo.“

„Vi diris al li, ke Via dunganto ĉiam kunhavas ĝeneralan ŝlosilon, ĉu?“

„Jes. Sed mi ne pensis, ke Fred mortigus la estron. Li diris, ke li volus nur senkonsciigi lin. Ni atendis lian alvenon, sed anstataŭ nur bati lin teren, Fred mortpikis lin. Tiam ni malfermis la dompordon kaj metis lin en la koridoron. Kion ni trovis, ni partigis ĵus rekte tie.“

„Morgan prenis la diamantojn, kaj Vi ricevis la kromon, ĉu?“

„Jes. Ĉar mi estas fakulo, ne estis malfacile al mi monigi mian parton, kvankam per perdo —“

„Kaj nun, ha, mi antaŭsentas! Tiun monon Fred Morgan nun deprenis de Vi, ĉu?“

„Ĝuste.“

„Ĉu Vi vere estis tiel malgardiĝe kredi, ke tia malica homo traktos Vin honeste? Vi ja tute facile povis antaŭsenti, ke li logis Vin en la sovaĝejon nur pro senpunate akiri la tutan rabaĵon! En kiu maniero li deprenis la monon de Vi?“

„Morgan hieraŭ vespere gardadis. Mi dormis profunde. Subite mi sentis tuŝon kaj vekigis. La fiulo jam estis depreninta de mi la armilojn kaj la monujon, kaj ĵus estis puŝonta sian tranĉilon en mian bruston. La timo fortigis min. Mi ĵetis lin flanken, salte stariĝis kaj forkuris. Li sekvis min, sed ĉar malhelis, mi sukcesis fuĝi. Dum la tuta nokto mi kuradis, ĉar mi ja povis ekspekti, ke li sekvis mian spuron, tuj kiam la tago komencis. Nur antaŭ mallonga tempo mi kuraĝis kaŝiĝi tie ĉi pro iomete dormi. Sed mi ne povis, ĉar la indianoj preterrajdis. Tial mi tuj volis pluiri. Tiam mi ekvidis tiun ĉi ruĝulon kaj rekaŝiĝis. Li tamen trovis min!“

La viro estis tre elĉerpita. Eble tiu fakto kaŭzis la plejparton, ke li konfesis ĉi ĉion tiel libervole, ĉar en la sono de lia voĉo aŭdeblis ne multe da pento kaj interna kortuŝiteco.

Mi turniĝis al Bernard, kiu intertempe estis alpaŝinta.

„Tiu viro estas Via. Kion Vi faros pri li?“

Marshal silentis. Certe en lia koro interbatalis la venĝo kun la kompatato. Tiam li faris kelkajn demandojn plu al Holfert, kaj fine sciigis nin:

„Tiu fiulo kulpas pri la morto de mia patro, kaj meritas la morton jam pro la leĝoj de la savano. Sed mi estas akuzanto en tiu kazo, do partia, kaj tial la posteno kiel juĝisto ne konvenas al mi.“

„Ankaŭ tute ne necesas, *Mr. Marshal*“, nun Sans-ear aŭdebliĝis. „Ekzemple ja ankaŭ ni ĉeestas. Mi voĉdonas pro morto. Donu kuglon al la krimulo! Tiaj parazitaj estu ekstermataj.“

„Ankaŭ mi voĉdonas pro lia morto“, Winnetou asertis la juĝon de Sans-ear. „Sed la krako de pafado disiĝos longadistance kaj povus malkaŝi nin. Ĉi tie estas sufiĉe da arboj. La negro pendigu la perfidiston de la neksta dika branĉo. Kion pensas mia frato Old Shatterhand?“

Mi volis kontraŭi al la juĝo, kiu ŝajnis al mi tro draste. Sed mi ne povis eldiri miajn pensojn, ĉar okazis io, kion neniu el ni estis ekspektinta. Ni ĉiuj fine ne estis atentigintaj pri la kaptito. Kiel li sukcesis deigi sian katenon tiel rapide, mi ne scias. Verŝajne Cäsar estis estinta iomete neatentiĝe dum la lozigo de la zono. Jam antaŭ mi malfermis mian buŝon pro kontraŭdiro, Holfert rapide kuris per saltoj, kiujn mi neniam estus ekspektintaj de liaj malfortigita korpo preter ni kaj sub la arboj, eksteren al la loko, kie staris la ĉevaloj.

Tuj ni estis sekvantaj lin, sed ni nur povis rigardi, kiel li forgalopis sur la ĉevalo de Marshal al la Pecos, kies bordo je tiu loko estis ĉirkaŭ dumil paŝojn for.

„*Bless me!*“ Sans-ear koleris, nu ekzemple tiu fiulo forrajdas sen diri *good bye*. Rapide, ni sekvu lin!“

Mi hastis al mia mustango, saltis sur la selon, kaj premis la spronojn sur ĝiajn mal-molejojn, ĵus kiam Holfert estis atinginta la bordon. Lia ĉevalo jam eksaltis, tiam krakis malantaŭ mi la arĝentpafilo de Winnetou. La fuĝanto lasis la kondukilojn, trafite meze tra la kapo, kaj falis en la fluon de la Pecos, kiuj tuj rekuniĝis super li. La senestra ĉevalo reenaĝis al la ĉiflanka bordo laŭ arko, kaj laŭte blekante trabis al ni.

Winnetou fridsange reŝarĝis la pafitan tubon.

„La spirito de la savano justas; la blanka viro devis ekmorti. Bedaŭrinde nun tamen krakis la pafo, kiun la apaĉo ŝate estus evitinta. Sed la fiulo nepre ne povis esti permesita fuĝi vivante, ĉar li estus malkaŝonta nin. La Granda Spirito postulis lian morton.“

Tiam la apaĉo surĉevaliĝis kaj forrajdis, sen reenvidi al ni.

Silentante, kaj en serioza humoro ni sekvis. Enpense mi ekzamenis la kondutan manieron de Winnetou, kaj devis konfesi, ke li pravis.

La spuroj de la komanĉoj ankoraŭ restis bone videblaj. Ke ili estis elirintaj pro milito, tion ni eksciis per iliaj ŝminkaĵoj. Sed ilia celo certe estis longadistance for, alikaze ili estus konduktintaj pli gardiĝe. Winnetou certe konis ilian intencon, sed li estis multe tro silenteme, ke li estus farinta komenton pri tio sen urĝa kaŭzo. Mi ĵus volis proksimiĝi al lia flanko, kiam ni ekaŭdis antaŭ ni unu — du — tri pafojn kraki.

Tuj ni haltis. Winnetou mansignis rajdi reen, kaj mem plurajdis ĝis la neksta kurbo. Li deĉevaliĝis kaj hastis en la arbedaĵojn, el kiuj li baldaŭ reaperis pro venigi nin per mansigno.

„Komanĉoj kaj du palvizaĝoj!“

Post tiuj vortoj li rerampis en la arbedaĵojn, kaj ni tri sekvis, dum Cäsar restis ĉe Hoblyn kaj la ĉevaloj.

Antaŭ ni la valo de la Pecos plivastiĝis al vasta valo, kie prezentiĝis al ni surpriziga vidaĵo. Dense ĉe la dekstra bordo de la rivero la ĉefoj de la komanĉoj estis pikintaj iliajn lancojn en la teron, kaj apogigis la ŝirmilojn al ili. Ili mem sidis sur la tero kaj fumis iliajn kalumetojn kun du blankuloj, kiuj estis sidiĝintaj je ambaŭ flankoj de ili. La bestoj de tiuj kvar viroj paŝtiĝis en la proksimo. Antaŭ ili videblis militece sovaĝa, sed tamen pacema scenaĵo: la komanĉoj faris unu el tiuj batalludoj, dum kiu ili pruvis ilian plenan mastrecon pri la rajdado kaj la traktado de la armiloj. La distanco estis tro granda, ke oni povis ekkoni la vizaĝojn de ili, kaj tial mi ekprenis mian teleskopon. Subite mi miregis:

„*Halloo*, kio estas tio! Mark, travidu!“

Sans-ear prenis la tubon kaj direktigis ĝin.

„*’s death*, estas Fred Morgan kun sia filo! Ili do renkontiĝis jam tie ĉi, kaj dum tio estis trovitaj de la *indsman*:oj.“

„Ĝuste. Patrick ĉiam estis mallonge antaŭ ni, kaj Fred Morgan sekvis tiun Holfert:on de la Peñasco. Tiel ili renkontiĝis tie ĉi. Kaj ili tute ne kaŝiĝu antaŭ la *indsman*:oj, kiel vi ja aŭdis.“

„Tiel ĝi certe estis. Malbona turniĝo de la afero!“

„Kial?“

„Kiel ni povos igi tiujn du el la mezo de la *indsman*:oj?“

„Mi esperas, ke la blankuloj kaj la ruĝuloj ne restos kune. Ja tute ne povas esti la intenco de la du fibuboj sciigi la indianojn pri la trezoro, kiujn ili volas elterigi.“

„Tiukaze plej bonas, ke ni atendas tie ĉi pro rigardi ilin.“

„Ni ŝajnas esti sekure tie ĉi, ĉar ne estas supozenda, ke unu el la ruĝuloj iros reen.“

„Ĉu ne povas iri Morgan, kiu ja volas sekvi Holfert:on?“ Marshal demandis.

„Fred Morgan ekscios de sia filo kaj de la komanĉoj, ke ili ne renkontis Holfert:on, kaj li supozos, ke li direktiĝis sur alian vojon“, mi konkludis. „Ni konduku la ĉevalojn en kaŝejon!“

Winnetou aserte kapjesis, kaj mi paŝis reen pro fari tion. La ŝarĝaj ĉevaloj, ĉar estis ekspektinda plurhora restado, estis deŝarĝataj kaj kondukataj kune kun niaj aliaj bestoj iom pli profunde en la arbaron.

Kiam Hoblyn ekvidis la valon, li etendis la brakon.

„*Sir*, tien dekstren kondukas la kanjono, kiun ni sekvu!“

„Ĉu tie? Tio malbonas!“

„Kial, Charley?“

„Ĉar ni ne povas iri tie pro alveni antaŭ la du. Vi ja povas pensi, ke ili survojiĝos tuj post la ekrajdo de la komanĉoj.“

„Ne zorgu pri tio, *Sir*!“ Hoblyn enĵetis. „Tiun vojon konas nur la *capitán* kaj mi. La leŭtenanto sed iras laŭ alia, kiu kondukas supren pli malsupre laŭ la fluo de la Peñasco.“

„Tiukaze bonas, kaj ni povas rigardi tiujn homojn trankvile kaj senzorge!“

La komanĉoj estis partiĝitaj en du grupojn, kiuj ŝajnige batalis unu kontraŭ la alia, foje kiel kuniĝita trupo, foje disiĝita per sola batalo unu kontraŭ unu, kaj prezentis dum tio eltenpovon kaj viklecon, kiu certe estus miregiginta ĉiun eŭropan spektanton. Ĉe ili ne estis seloj, kaj ankaŭ ne bridajoj. Ili fiksligas kovrotukon, felon aŭ maton sur la dorson de la ĉevalo. Je ĉiu flanko de tiu felo estas fiksigita vasta, aparte robusta rimeno, kiu estas metata sur la kolon de la ĉevalo kaj utilas pro trami la brakon, kiam la rajdanto volas premiĝi sur tiun aŭ la alian flankon de la ĉevalo, dum li restas pendigante de la ĉevaldorso per unu piedo. Tiu propreca selajaro kaj la longa trejnado ebligas la rajdanto uzi la ĉevalon kiel ŝirmilon, igi ĝin inter la malamiko kaj si mem, sed tamen havi sufiĉe da moviĝa spaco pro pafi sagon, aŭ, se li estas posedanta pafilon, sendi kuglon al la malamiko trans la dorso aŭ sube tra la kolo de la ĉevalo. La ruĝaj militistoj dum tio estas tiel elstare lertaj, ke ili kapablas sin ĵeti, laŭ la bezono, foje sur la dekstran, foje sur la maldesktran flankon de la besto per facileco kaj rapideco, kiu estus honoro al ĉiu akrobata rajdisto. Kaj iliaj ĉevaloj paŝadas tiel certe, ke nur tre malofte kuglo aŭ sago mistrafas la celon. La rimeno, sub kiu la brako pendas profunde ĝis al la ŝultro, estas fiksigita al la kolharoj sur la postkolo de la besto tiel, ke eĉ en la kazo, ke la seltuko loziĝas, tiu tenejo ne povas esti perdata. Kiam la lerta rajdanto bone fiksigis la maŝon, li bezonas pro la efikigo de siaj artaĵoj tute ne kovrotukon kaj tute ne selon: liaj per mokasenoj vestitaj piedoj kvazaŭ gluas per la kalkano certe kaj fikse ankaŭ sur la nuda ĉevaldorso.

Nia tuta atento estis koncentrata pri la batalludoj de la komanĉoj, kiu similis al araba *fantasia*, kaj nur unu solan fojon mi vidis reen tra la arbedoj al la direkto, el kiu ni

venis — je nia feliĉo, ĉar ĵus ĝustatempe mi vidis malsupreniri laŭ la arbara rando du rajdantojn, kiuj zorgeme vidis al la spuroj de la komanĉoj.

„*Have care*, Vi viroj, tie venas homoj!“

Ĉiuj vidis reen.

„La *capitán* kaj Conchez!“ Hoblyn ekscitigite elpuŝis.

„Verece, estas li! Rapide pli fore en la arbaron, kaj forviŝu la spurojn!“ mi urĝis.

Tio estis farita post du minutoj. Nur mi kaj Winnetou restis je pli antaŭa loko, kie estis eble al ni rigardi la proksimiĝantojn, sen ke ili rimarkis nin.

Ili jam estis tre proksime, kaj certe ili estus rajdintaj ĉirkaŭ la kurbo, se ne ĵus nun la komanĉoj estus laŭtigintaj batalan vokegon, kiu sonis kiel kriado de sovaĝaj bestoj. La du rajdantoj ekhezitis, deĉevaliĝis, zorgeme videtis ĉirkaŭ la angulo, kaj tiam kondukis iliajn ĉevalojn al la loko, kie niaj estis starintaj. Ni cedis reen al niaj kunuloj.

Proksime malantaŭ la alvenintoj estis du aceroj dense flanke de la alia. Mi sukcesis kaŝe rampi al ili, pro aŭskulti la duonlaŭtan interparolon de la du viroj, kiuj estis sidiĝintaj.

„Estas komanĉoj“, la *capitán* diris. „Do ni ne timu ion de ili. Sed ni antaŭe sciu, kiuj estas la du blankuloj.“

„La distanco tro grandas. Oni ne povas ekkoni ilin.“

„Oni povus orientiĝi laŭ la vestaĵoj. La antaŭan mi ne konas, kaj la alia estas kovrata de la ĉefoj.“

„*Capitán*, vidu al la helvulpafelulo el la kvar ĉevaloj! Ĝi surhavas bridaĵaron, kiu estas tre malofte sur la savano kaj en la montaro. Kion vo pensas pri tio?“

„*Carája*, estas la ruĝfelulo de la leŭtenanto!“

„Tion mi ankaŭ pensas. Tiukaze la dua blankulo estas neniu alia, sed li.“

„Ĝuste! Nun li kliniĝas antaŭen. Ĉu vi vidas la multkoloran *serape:n*? Estas li. Kio farendas?“

„Nu, se mi nur scius, kion li fakte planas fari kun li, ni eble povus paroli pri la afero.“

„Nun verece necesas, ke mi parolas malkaŝe al vi. Fakte mi estis enterigita la plej bonajn aĵojn de niaj trezoroj en tiu ĉi regiono, ĉar mi ne volis teni tion en la *hide-spot*, ĉar estas kelkaj inter ni, pri kiuj mi ne povas fidi. La lokon, kie la aĵoj estas, konas neniu escepte de mi kaj la leŭtenanto. Li atendis sian patron kaj interkonsentiĝis renkonton kun li tie ĉi ĉe la Rio Pecos — anstataŭ ĉe nia restejo. Tio vekis mian suspekton, kaj ĉar li iris rekte tien ĉi post lia lasta rajdado tra la Estacado, sen unue reeniri al mi, mi estis konvinkita, ke li planas forrabi nian trezoron. La *indsman*:ojn li renkontis nur hazarde. Nun estas la demando, ĉu ni iru rekte nun al li kaj punas lin, aŭ ĉu ni sekvas lin kaj surprizas lin dum la elterigo.“

„La dua propono ĉiukaze estas la pli bona. Se ni vizitus lin tie malsupre, estos neeble pruvi lian malican intencon. Li simple konstatos, ke li venis tien ĉi nur pro venigi sian patron, kaj kiu scias, kiajn eblecojn li havos plu pro atingi sian celon. Ni estas duope, li kun sia patro ankaŭ, kaj ni ne povas certe fidi pri la *indsman*:oj.“

Conchez videble klopodis dekonduki sian ĉefon de la unua plano. Laŭŝajne estis tre grave al li ekkoni la lokon de la kaŝejo.

„Vi pravas“, la *capitán* kapjesis. „La rakuroj estas elrajdintaj pro milito, kaj restos tie ĉi nur mallongan tempon. Poste Patrick tutcerte ekiros. Li ankoraŭ devos rajdi longan distancon, ĝis li povos flankeniĝi. Sed mi scias pli mallongan vojon, sur kiu ni atingos la lokon antaŭ li. Li nepre ricevu nenion, se — se la trezoro entute ankoraŭ tieas.“

„Ĉu tieas? Kiu do forprenis ĝin, kiam nur vi du konas la kaŝejon?“

„Hm, Sans-ear kaj Old Shatterhand, al kiu ni ŝuldas nian lastan egan perdon.“

„Ĉu ili? Kiel nu tiuj du povis ekscii ion pri la sekreto?“

„En tute facila maniero. Mi volis sendi Hoblyn:on post la leŭtenanto, kaj estis tiel malgardiĝe jam doni al li la necesajn informojn. Li malaperis senspure, kaj mi ne povas forigi la senton, ke li iĝis sub la forton de la ĉasistoj, kaj alianciĝis kun ili pro savi sian vivon.“

„Hm, tiukaze estus plej bone, se ni —“

„Nu, kio?“

„— se ni kontaktiĝus al la komanĉoj.“

„Kaj sciigas nian sekreton al ni, tiel ke ili forprenos la trezoron de ni, ĉu? Ne. Cetere ni havas la tempon ankoraŭ pripensi la aferon, ĉar mi vidas, ke la ruĝuloj deseligas iliajn provizajn sakojn. Ankaŭ ni povas manĝi iomete. Alportu la viandon!“

Kiam Conchez stariĝis pro iri al la ĉevaloj, li nepre devis vidi min. Tial mi laŭeble rapide rampis reen, kaj fakte iĝis el la vidodistanco de liaj okuloj ne unu sekundon tro tarde.

Mi sciigis la kunulojn pri la rezultoj de mia aŭskultado.

„Pri la tri memdeklaritaj peltaĉetistoj, kiuj rajdis post la komercistoj, ili ekzemple diris nenion, ĉu?“ Mark demandis. „Almenaŭ unu el tiuj devus esti ĉe Patrick.“

„Ne, nenion. Eble li murdis tiun unu, pro povi agi libere. Sed kion ni faru pri tiuj du tie transe?“

„Trankvile lasu ilin iri, Charley.“

Winnetou skuis la kapon.

„Miaj blankaj fratoj pripensu, ke ili povas perdi nur unu skalpon!“

„Kiu prenu ilin de ni?“ Mark respondis.

„La militistoj de la rakuroj.“

„Ili ne sukcesos tion. Entute ili baldaŭ foriĝos, ĉar ili estas sur la vojo de la milito.“

„Mia blanka frato estas ruza ĉasisto kaj brava militisto, sed li ne konas la vojojn de la komanĉoj. La ruĝaj viroj, antaŭ ili kaŝrampos al la *wigwam*:oj de la apaĉoj, iros al la montoj al la tomboj de ilia ĉefo Tŝu-ga-ĉat, kiel ili faras ĝin ĉiun jaron ekde la jaro, kiam li estis mortigata de Winnetou.“

Nun subite klariĝis, kial Winnetou sekvis tiun trupon de la komanĉoj.

„Tio ja egalas“, Mark diris. „Se ili vere estas sur tia vojo, ili ekzemple tute ne zorgiĝos pri ni kaj la *stakeman*:oj.“

„Ankaŭ mi volas ne makuliĝi per sango, se tio ne necesas“, mi asertis.

„Miaj blankaj fratoj faru, kion plaĉas al ili“, diris la apaĉo. „Ili indulgas pri la malamikoj, kiu estas rabisto kaj murdisto, sed fine fordonos ilian propran sangan. La apaĉoj finparolis. *Hongh!*“

Mi bedaŭris devi kontraŭi al li, sed jam foje la sango de homo estis verŝita hodiaŭ, kaj kontraŭis al miaj sentoj direktigi la armilon eĉ al murdistoj, se tio ne estis ordonata de sindefendo.

Ankoraŭ mi pensadis pri tio, kiam eksonis vokoj de la restejo de la komanĉoj, kiuj konkludeblis pri neekspektita okazo. Ni rimarkis, ke ankaŭ la *capitán* kun sia akompananto atentigis, kaj tial mi kaŝiris laŭ arko al la arbara rando pro sciigi pri la kaŭzo.

Kiam mi estis atinginta punkton, kiu certigis al mi sekuran travidon, mi vidis la komanĉojn dense kuniĝinte stari sur la bordo de la rivero, kaj rigardi aĵon, kiun mi ne povis vidi klare. Post kelka tempo ĝi estis reenpuŝata en la Pecos:on. Post tio ĉiuj militistoj stariĝis en rondo ĉirkaŭ la du ĉefoj kaj la blankuloj. Tiam subite ĉiuj surĉevaliĝis kaj plurajdis laŭ ilia vojo. Mi reeniris al la kunuloj.

„Kio estis?“ Bernard demandis.

„Ili trovis ion en la rivero, eble eĉ la korpon de Holfert.“

Winnetou ekatentigis. Se mi pravis, nia ĉeesto nun estis malkaŝita!

„Ĉu mia blanka frato kredas, ke morta viro povas esti naĝigata tian longan distancon en tiel mallonga tempo?“

„Kondiĉe, jes. La Pecos tie ĉi profundas kaj rapidfluas, kaj havas glatan bordon, tiel ke io nefacile povas kuŝiĝi ie.“

Sen diri unu vorton plu, Winnetou stariĝis kaj malaperis madekstre malsupren inter la arboj. Tutcerte li nun iris en la sekuron de la arbaro tiel longe kontraŭflue, ĝis li ne plu povis esti vidata, kaj tiam enakviĝis pro naĝi al tiu loko kaj sciigi, kiun aĵon tie evidentigis al la komanĉoj.

Kvankam la apaĉo estis la plej bona naĝanto, kiun mi konis, mi tamen diru, ke tiu plano ne estis sendanĝera. Unue la *capitán* kaj Conchez povis ekiri al la rivero, pelata per la sama scivolo. Due, kio estis supozende verŝajne, la komanĉoj povis eksuspekti kaj konkludi, ke iu estis en la proksimo, kiu estis farinta la mortigan pafon al tiu freŝmorta korpo. Tiukaze estis supozenda, ke ilia foriro nur estis trukaĵo, kaj ke ili revenus pro certigo. Same kiel estas certa regulo dum militiro, ke oni ne lasas fortikaĵon nevenkita aŭ almenaŭ embuskite malantaŭ si, tiel estas danĝera en la Sovaĝa Okcidento ne scii, kiu iradas malantaŭe.

La distanco, kiun Winnetou devis naĝi unue laŭflue, kaj poste ree kontraŭflue, estis ĉirkaŭ duona mejlo. Li, kiel bona naĝanto certe bezonis duonan horon pro pasi ĝin, kunkalkulite dek minutojn pro la pasenda vojo surlande. Sed jam li ne forestis kvaronan horon, kiam la *capitán* kun sia akompananto ekiris.

Okazis, kion mi estis supozinta: ili rajdis al la restejo de la komanĉoj, kaj tiam turniĝis al la rivero. Nun gravis savi Winnetou:n, kiu tutcerte tie, kie li enakviĝis, demetis siajn vestaĵojn kaj armilojn, kaj boneble nur kunhavis la tranĉilon, senke mi lasis min vidi dum tio. Mi ekprenis mian Henry-pafilon.

„Restu tie ĉi!“

Post tiuj vortoj mi forlasis nian kaŝejon kaj hastis, tiel rapide kiel la arbaro permesis tion, laŭ ĝia rando al loko, kie la rilata aĵo estis reĵetita en la akvon, estis senkovre antaŭ mia pafilo. Sed mi ne jam estis atinginta tiun lokon, kiam la *capitán* levis sian pafilon

kaj pafis en la akvon. Certe li ne trafis. Mi konis la lertecon de Winnetou subakve. Kaj fakte mi vidis lin ne kvin sekundojn poste elakviĝi rapide kiel fiŝo, grimpi sur la bordon kaj atake salti al la *capitán*. Tiam Conchez levis la pafilon. Per fulmrapida moviĝo Winnetou deturniĝis de la *capitán*, saltis transe al Conchez, kaj batis la tubon de la pafilo supren, ĵus en la momento, kiam li volis lanĉi. La pafo iris al la ĉielo. Winnetou deŝiris la pafilon de li, ekprenis la tubon pro uzi ĝin kiel klakon, kaj ĵus ĝustatempe faris grandan salton flanken, ĉar la *capitán* estis jam resvinginta, pro klabbategi lin de malantaŭ.

Nun Winnetou ekmoviĝis pro ataki ilin ambaŭ samtempe, kiam eksonis laŭta kriado de malsupre. Tiel do ankaŭ realiĝis mia dua antaŭsento: la komanĉoj estis ne forrajdintaj longan distancon, kaj aŭdis la pafon de la *capitán*. Galope ili revenis.

Apenaŭ ke Winnetou estis rimarkinta ilin, li batis la pafilon, kiu feliĉe nur havis unu tubon, el la mano de la *capitán*, transĵetis la pafilon for en la akvon kaj kuris en saltoj, kiuj similis al tiu de ĉasata pantero, kontraŭflue.

Mi sciis, ke li kapablis vetkuri kun la plej rapida kuranto plenajn dek minutojn. Li estis instruinta tiun manieron al mi, dum kiu oni ne kuras, sed ĵetiĝas per longaj saltoj tra la aero, metante la korpan pezon ĉiam nur sur tiun kruron, kiu kvazaŭ estas risorto, kaj ŝanĝas sur la alian, kiam ĝi laciĝas kaj komencas tremi. Winnetou ne bezonis dek minutojn atingi siajn vestaĵojn, kaj tiam li tutcerte estis sufiĉe saĝe ankoraŭ fuĝi kelkan distancon plu, ankaŭ li flankeniĝis en la arbaron kaj revenis al ni en ĝia sekureco.

Laŭeble rapide mi kuris al nia kaŝejo.

„Ek, rapide! Ni devas fuĝi!“

„*By Jove!* Kien ekzemple?“ Mark demandis. „Tie venas la komanĉoj. La du blankuloj ankaŭ estas inter ili!“

„Tio estas bonfeliĉo. Ili rapidrajdos preter ni, kaj estos sufiĉe okupataj tie supre per trovi la spuron de Winnetou! Ekprenu la ĉevalojn kaj konduku ilin al la arbara rando! Tuj kiam la ruĝuloj pasis, hastu laŭflue, sur ilia propra spuro, proke ili ne povos diferencigi Vian. Mi restos tie ĉi pro sekurigi la reeniron kaj atendi la apaĉon.“

„Ĉu vi sole?“ Mark demandis.

„Jes“, mi respondis kun klariganta vidon flanken al Hoblyn, kiu ankoraŭ ne estis prifidinda. „La aliaj ankoraŭ ne havas sufiĉan sperton. Mi donu ilin sub vian gardon.“

„*Well*, tiukaze antaŭen; ili pasis!“

Vere la lasta komanĉo ĵus estis rapidanta preter ni, kaj nun la arbara angulo estis inter ni kaj ili, tiel ke ni ne plu povis esti vidata de ili. Dum Mark forrajdis kun la aliaj, mi neigis la spurojn, laŭeble bone tio fareblis. Mi ĵus finigis tion, kiam susuris en la subkreskaĵoj. Winnetou staris antaŭ mi.

„*Uf!* La komanĉoj serĉas la spuron de la apaĉo. Kie estas la kunuloj de mia blanka frato?“

„Ili antaŭrajdis.“

„La pensoj de mia frato ĉiam estas saĝaj. La palvizaĝoj ne atendu nin longe!“

Li haste surmetis siajn vestaĵojn, kiujn li ĝis tiam estis teninta en la mano, kaj tiam tiris sian ĉevalon en la liberon. Vido al la malsupro de la valo sciigis min, ke ni nun

ankoraŭ estis sekure antaŭ la komanĉoj. Tial mi permesis al mi tempon pro demando.

„Kion mia ruĝa frato trovis en la Pecos?“

„La korpon de la palvizaĝo. Winnetou hodiaŭ agis kiel knabo, kiu ne havas pensojn. Sed li respondecos pri la konsekvencoj, kaj liaj blankaj fratoj pardonos al li!“

Tio estis konfeso, kiun la fiera apaĉo certe ne estus farinta al iu alia, sed nur al mi sole. Mi ne povis respondi, ĉar li jam forrajdis rapide kiel tempesta vento, tiel ke mi same rapide devis sekvi lin sur mia mustango.